

NEDERLANDA KATOLIKO

Maandblad, officieel Orgaan van den Nederlandschen
R.K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”,
gevestigd te 's-Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909. Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd
Ĉio per amo, nenio per forto. (*S. Franc. de Sales*)

Geestelijk Adviseur LAMB. J. J. M. POELL

Abonnementsprijs
f 1.50 per jaar
Eksterlanda Jarabono f 2.—

Adres der Redactie:
P. M. BROUWER
Fahudstraat 134
's-Gravenhage.

Afzonderlijke nummers
20 cent.
Advertentiën
30 cent per regel.

Administratie: J. A. LEIBBRAND, Tilburg.

GLORO AL DIO.

Rekantaĵo: Gloro al Dio en la plejaltaĵo.

Dolĉe la anĝela hor'
Kantas en la nokta hor'.
Laŭte sonas tra l' aer':
„Paco, paco al la ter'!”
En manĝujo, en la grot',
Kuŝas Dio Sabao',
Kiel dolĉa Infanet'!
Cardas Lia Patrinet'
Gloro al Di'!

Iru, vi paŝtistoj, tuj,
Trovos vi nun en manĝuj',
Infaneton el l' Eden',
Inter bovo kaj azen'!
Estas Kristo Li, Savont'
De l' mizera, peka mond'.
Do ne timu; paco vin!
Venu kaj adoru Lin!
Gloro al Di'!

Vidu homo, kiel Di'
Humiligis sin por vi!
Li, la Reĝo de l' ĉiel',
Hominĉan', Emanuel'!
Kia sankta Dimister'!
Amofonto en sufer'!
Tiel amas Dio vin;
Homo kore amu Lin!
Gloro al Di.

Fr. M. BARTHOLOMEUS.

PRI LA LASTA JUGO

„Pro timo la homoj sekiĝos atendante tion kio estas okazonta; ĉar la fortoj de l'ĉielo removiĝos: kaj tiam ili vidos la Filon de l'homoj kun granda povo kaj majesto venantan sur la nuboj de l'ĉielo. Sed rilate al vi, kiam la plenumado de ĉi tiuj okazontajoj komencos, levu tiam viajn okulojn supren, ĉar via savo estos apuda.” (Luk. XXI. 26 — 28)

Jesuo, kies titoloj nun elspiras por ni nur dolĉecon kaj amon: Jesuo, nia Savinto, nia Paŝtisto kaj nia Frato, fariĝos nia Juĝisto tiun gravan kaj teruran tagon, kies memoro tremiĝis kaj maltrankviligis la plej grandajn Sanktulojn. Tiam ĉiuj niaj laboroj estos pesataj per la pezilo de la sanktejo en la pesilo de la Dia Justeco: La Dia Justeco petos de ni respondon pri ĉiuj siaj gracoj; ekstreme akurate ĝi esploros, ĉu la fruktoj de sankteco, kiujn ni produktis, vere respondas al nia vivostato kaj al la pruvoj de amo kiujn Jesuo donis al ni. Ho, kia grava afero estas por ni, ke ni tute zorgeme nin preparu al tiu tiel severa prirespondo!...Sed, kiel ni, malfortaj kaj senpovaj kreitaĵoj, povas nin disponigi por konfide aperi antaŭ Dio, kies justeco estas senfina?...Ni havas nur unu riuiĝejon, nur unu rimedon, tio estas: ni metu la interesojn de nia eterneco en la manojn kaj en la Koron de nia Dia Majstro; ni nin transdonu plenkonfide al Li; ni Lin servu tiel grandanime kaj tiel fervore ke ni meritu, ke Li mem nin preparu al la tago de justeco. Li ne povos prononci kontraŭ ni verdikton de kondamno, se ni ĝis nia lasta elspiro restas fidelaj al la promesoj faritaj al lia Sankta Koro. Sinjoro, donu al ni tiun gracon!

„Tuj post tiuj tagoj de turmentado, vidiĝos signoj en la suno, en la luno kaj en la steloj....La popoloj troviĝos en teruro, ĉar la furioza maro aŭdiĝos terurigan bruadon....La homoj atendantaj tion kio estas okazonta, sekiĝos pro angoro.... Tiam ili vidos la Filon de l'homoj kun granda povo kaj majesto venantan sur la nubojn de la ĉieloj; Li sendos siajn Anĝelojn, kiuj, je la sono de l'trumpeto, kunvokos liajn elektitojn de el la kvar anguloj de l' mondo, de unu limfosto de l'ĉielo ĝis la alia.”

„Ĝenerala Juĝo”...Lumigita nubo montriĝas sur la Ĉielo kaj malsupreniras sur la teron... Ĝi estas la trono de l'Filo de Dio.... Kia gloro!... Kia majesto!... Lia kruco estas triumfe portata.... Anĝeloj portas la libron de la Sanktaj Evangelioj, kaj la teruran libron de la konsciencoj, kies misteroj estos konigitaj.... Ĉiuj generacioj, pli multnombraj ol la sableroj de l'marbordo, estas kunigitaj je la piedoj de la Supera Juĝisto.... Li ordonas al siaj Anĝeloj ke ili separu la elektitojn de la kondamnitaj, kiel ŝafisto separas la ŝafojn de la kaproj.... Tiu separado okazas en unu momento; la virtulojn oni lokas al lia dekstra —, la malvirtulojn al lia maldekstra mano; ĉiuj atendas la verdikton. —

Jesuo, la Supera Juĝisto, la Glora Reĝo, estas parolonta; unue Li sin direktas al la justuloj kaj diras al ili: „Venu, benitoj de mia Patro!”. . . . Kial, Dia Savinto, tiun tiel dolĉan kaj tiel intiman nomon? Ha! mi komprenas: viaj elektitoj imitis Vin, ili, dum sia vivo, kunigis sin al Vi, kaj tial via Patro ilin konos tiun tagon kaj ilin benos. . . . „Venu, kaj ekposedu la regnon, preparitan por vi ek de la komenco de l'mondo.” Tiu regno min apartenas; Mi ĝin konkeris pere de miaj suferoj kaj morto; sed Mi ne volas posedi ĝin sole; vi estas miaj vivantaj membroj; grandanime vi partoprenis la batalon de via Estro: partoprenu nun ankaŭ lian gloron: „Venu, kaj ekposedu la regnon, preparitan por vi ek de la komenco de l'mondo,” ne nur loĝu en ĝi, sed „posedu” ĝin. . . . Kia neelparolebla ĝojo superŝutiĝos en tiu momento, sur la elektitoj! Kune kun la Anĝeloj ili ĉiuj ekkantos kanton de dankemeco!

Nun ni konsideru la teruran angoron de la pekuloj. . . . ilia kondamno estas elparolota: — „For de Mi, malbenitoj!”. . . . Kia terura verdikto! Foriri de Jesuo, kaj tio por ĉiam! . . . „Foriru”. . . . Kien ili iros, ho Sinjoro? . . . „Al la eterna fajro, preparita por la demonoj!”. . . . Ni primeditu ĉion teruran, kiun enhavas tiuj vortoj por la malfeliĉaj viktimoj de l'peko; ni komparu ilian situacion kun tiu de la Justuloj, kaj ni demandu al ni mem, ĉu la malfacilaĵoj de la virto devas nin reteni, nin, kiuj sen ia dubo iam aŭdos super ni unu el la du verdiktoj! . . . Ni do nun laboru! . . . La tempo estas mallonga, — la eterneco neniam finiĝos; eterne ni estos ĉu feliĉaj, ĉu malfeliĉaj, — ĉu benitaj, ĉu kondamnitaj!!!!

KION JUNA ESPERANTISTO SKRIBAS : LA JUNULARO KAJ ESPERANTO.

Nuntempe multa propagando estas farata por donigi lokon al Esperanto en la lernejoj.

En Nederlando Lia Moŝto, la Ministro de Instruado, Artoj kaj Sciencoj, kontentigis pli malpli la gepropagandistojn, per fakultative enkonduki Esperanton en la komerclernejoj. Sed kompreneble la celo ne jam estas atingita. Esperanto devas enkondukiĝi en ĉiuj lernejoj. Tamen tiu tempo estas eble ankoraŭ tre malproksima. Ĉu Esperanto devas resti nekonata de la geknaboj ĝis kiam nia lingvo internacia estos enkondukitita en — kaj estos lokata sur la programoj de — la lernejoj?

Ho ne! Ho ne!

„Sed,” vi diros, „kiel ni povas konvinki la junularon, ke Esperanto estas por ĉiuj necesajo? La knaboj kaj knabinoj estas ja tre inklinaj por diri: „Ĝi estas por mi tro malfacila!”

Mi respondas: „Se la Esperantistoj junaj rakontos al siaj kolegoj tion, kion ankaŭ mi spertis, la aliaj geknaboj ilin kredos tre verŝajne.”

Unue : Esperanto *ne* estas malfacila, ĉar oni bezonas nur tre mallongan tempon por lerni ĝin (Ekzemple : Mi lernis Esperanton dum tri monatoj, sukcesis je la ekzameno en Nimego, okazinte la 11 an de Julio 1931 a, kaj skribas nun artikolon en nia lingvo internacia.)

Due : Esperanto faciligas la lernadon de aliaj aferoj, ĉar Esperanto konsistas el vortoj Germanaj kaj Romanaj, do internaciaj vortoj.

Trie : Esperantistoj komprenas la signifon de tiel nomataj „fremdaj” vortoj, vortoj, devenintaj el aliaj lingvoj, kiajn oni trovas tre multe en la lingvo Nederlanda. Tio-ĉi estas granda facilajo ĉe la legado de libroj por niaj geknaboj.

Knaboj kaj knabinoj, precipe por vi mi skribis ĉi-tion !

Kompreneble, la plenkreskuloj devos resti la propagandistoj plej eminentaj. Sed ĉi-tiuj devas uzi sian tempon ofte por aliaj aferoj.

Tamen, kiom da fojoj vi deziras laboron, ĉar vi ne havas okupajojn !

Rakontu tiam al viaj geamikoj grandaj kaj malgrandaj ion pri Esperanto. Instigu ilin lerni ankaŭ Esperanton.

En la ekzamenejo mi vidis je la 11a de Julio tre malmultajn geknabojn. Mi esperas, ke en la estonto estos pli granda nombro da ekzamenkandidatoj junaj.

Malforgesu ankaŭ tion ĉi :

Ne pensu, kiam vi havas diplomon A : „Mi finas mian studon Esperantan.“

Ne, malĉesu vian studon kaj faru poste ekzamenon por diplomo B.

Mi jam aŭdas diri : „Ni ankoraŭ estas tro junaj.“ Sed pripensu, ke, kiam vi estos pli maljunaj, vi eble ne havos tempon por studado. Tamen nun vi jes havas la okazon.

Do studu pluen ! Kaj faru propagandon ! „La junularo estas la espero de la estonto.“ Veriĝu tio ĉi !!

ST. WELLENS.

Aĝo : 13 jaroj.

OVER EEN COURANTENARTIKEL.

In de „Courant” van Donderdag 3 September stond een tamelijk uitgebreid artikel, geschreven door Professor Dr. A. W. de Groot, met als titel: „Is een wereldtaal mogelijk?”

Het is niet mijn bedoeling bovengenoemd artikel te gaan uitpluizen, echter kan ik niet nalaten eenige punten daaruit onder de aandacht van onze „Gesamideanoj” te brengen.

Schrijver van het artikel zegt: „Volapük is vergeten,” maar is er zeker niet van op de hoogte, dat er zoojuist weer een compleet woordenboek en grammatica van Volapük is verschenen, en dat nog wel bij een Nederlandsche Firma. Dus vergeten is Volapük

nog niet. Ik wil hier geen lans breken voor Volapük, maar alleen even een aanloopje nemen om straks te kunnen beweren, dat Prof. Dr. A. W. de Groot op het gebied van Wereldtalen een *leek* is, die dus verstandiger zou doen te zwijgen over punten waar hij niets van weet.

Na een inleiding, waarin de Hooggeleerde schrijver een beetje over koetjes en kalfjes keuvelt, lezen we: „Het Esperanto, dat voornamelijk uit Romaansche woordvormen bestaat, telt in vele landen aanhangers, maar heeft geen litteratuur van eenige betekenis. Daargelaten de goede bedoeling, beteekent het voor vrijwel iedereen weer een taal méér, zonder dat één der andere daardoor overbodig wordt.”

We lezen verder: „In het bewust streven naar een bepaalde wereldtaal, kunstmatig of niet kunstmatig, zie ik weinig toekomst. Zonder een Wereld-Mussolini lukt dat niet. Het Esperanto is te Romaansch en te moeilijk, Hier geldt, geloof ik, beter ten halve gekeerd dan ten heele gedwaald.”

Daar hebben we 't nu!

Esperanto heeft geen litteratuur. Die onnoozele 700 werkjes, die in zoo'n korten tijd geschreven zijn (Natuurlijk alleen origineelen), wat beteekenen die? Prof. Dr. de Groot is natuurlijk méér gewoon.

Esperanto is te Romaansch. Juist d.w.z. voor 60 %. Maar ga eens even na, welke talen worden het meest gesproken: Romaansch, Germaansch of Slavisch? Stel eens voor, dat Esperanto voor 60 % Slavisch was, dan zouden we onzen Prof. denkelijk wel gelijk geven, als hij zou beweren, dat Esperanto te Slavisch was.

Dat Esperanto te moeilijk is, dat wisten we allang! Dat wordt dan ook bij elk examen bewezen door kinderen van 10 en 11 jaar, die het A. examen met zeer goed gevolg afleggen. Laten ze het maar eens in een andere taal probeeren. Prof. is dus wéér op de hoogte.

Wat de schrijver over een Wereld-Mussolini-beweerde, zou hij niet geschreven hebben, als hij maar iets van de Esperanto-beweging afwist, want dan zou hij ten eerste weten hoever de beweging al veld gewonnen heeft; ten tweede, dat het niet de bedoeling is van Esperanto, bestaande talen te verdrijven, maar wel om te dienen als bemiddelaar tusschen de verschillende talen sprekende volken; en ten derde, dat Esperanto absoluut niet opgedrongen wil zijn, maar juist integendeel, zelf zijn weg wil banen, wat tot op heden dan ook geschied is.

Tenslotte „beter ten halve gekeerd dan ten heele gedwaald” *gelooft* schrijver in dit verband. Als de Prof. verstandig is, wat zal hij dan doen? Dan gaat hij eerst Esperanto leeren, voor hij er weer eens iets over schrijven wil.

Beter ten halve gekeerd dan ten heele gedwaald.

Aan het slot van het artikel stonden nog de woorden: „Nadruk verboden”. Verstandiger kon het al niet.

JOS. A. DE ROOS, Eindhoven.

„SERVU!”

Ĉiuj legis kompreneble la alvokon de nia kara Prezidanto, Pastro Font Giralt, en la lastaperinta numero de „Espero Katolika”.

Mi ne bezonas multe aldoni al la vortoj de nia Prezidanto, ĉar ĉi tiu sufiĉe klare diris ke I.K.U.E. urĝe bezonas amason da konsuloj.

La tutan celon de la Serva Organizado de I.K.U.E. vi povas legi en la Jarlibro kiu ĵus aperis, do tion mi ne bezonas klarigi.

Mi nur volas fari proponon.

Unue al ĉiuj Prezidantoj de lokaj grupoj.

Ĉu en via loko estas jam konsulo? Ĉu tiu persono taŭgas por tiu honorofico?

Se ne estas en via loko konsulo, mi petas vin, esplori kiu(j) estos taŭga(j) persono(j) por esti konsulo, kaj sendu al mi la adreso(j)n kaj nomo(j)n. Se ekzistas jam konsulo, ĉu tiu konsulo povas fari la tukan laboron sole! Ĉu ne estas dezirinde, ke en via loko ankaŭ estos ina konsulo?

Skribu tion al mi kaj mi dankas vin antaŭe. Mi do atendas de ĉiuj lokaj prezidantoj almenaŭ mallongan opinionon pri la konsuleco en ilia propra loko.

Due: al ĉiuj personoj kiuj loĝas en lokoj kie ne estas grupo, do nur individuaj membroj. Kiu el vi povas kaj volas akcepti la konsulecon; ĉu vi scias persono(j)n kiu(j) estas taŭga(j)?

Ankaŭ de vi mi atendas mallongan respondon al tiuj ĉi demandoj.

La estontan kongreson I.K.U.E. nepre devas posedi bone organizitan Servan organizadon!

Sed ni ne forgesu la 7an art. de la Relugaro de la Serva Organizado!

Persono, akceptante la konsulecon, promesas laŭpove helpi ĉiujn membrojn de I.K.U.E., kiuj petas lian helpon. La konsuleco de I.K.U.E. estas Honorofico.

Eindhoven (Wal)

Centra Oficejo de la S.O.

TILBURGA NOVAĴO

La 3an Novembro okazis ĉiumonata kunveno por niaj membroj.

Diversaj punktoj estis pritraktataj, i.a. mondonaco por la Zamenhof-monumento, pago de la jarkotizo, ŝanĝo de la kunventago, k.t.p.

Por la Zamenhof-monumento estis kolektata malgranda sumo, la jarkotizo estos, pro la krizo, pagebla ankaŭ duonjare aŭ trimonate, la kunventagoj estis fiksataj je la unua merkredo de ĉiu monato.

La kunveno estis surprizata per la vizito de nia ligprezidanto,

Sinjoro H. Damen. Li paroladis pri la R.K. Pacligo kaj ĝia celo, instigante nin por kunlaboro, kion ni volonte promesis.

Lundon, la 9an de novembro, je la 8a vespere, okazis sekcia kunveno de la R.K. Laboristaro-unuiĝo en la paroĥo St. Anna.

La ĉefpunkto de la agendo estis: Prelego pri Esperanto de Frato Bartolomeus. Brilege la parolinto montris la diversajn profitojn, per Esperanto atingebajn por nia Katolika Eklezio.

La estraro esprimis le deziron ke ankoraŭ multaj tiaj prelegoj sekvos en aliaj paroĥoj, por ke oni kune povu aranĝi kurson. Tiel estu.

LA SEKRETARIO.

IN MEMORIAM †

Men bericht ons uit Haarlem:

Hier ter stede overleed samideano C. GODDE, een der oprichters van de afd. Haarlem. Door een lang en smartelijk ziekbed was hij reeds sedert lang niet meer in staat, onze beweging actief te steunen. Als vurig propagandist die immer fier zijn Esperantist-zijn beleed en menigmaal gelegenheid vond tegen tegenstanders in het strijdperk te treden, zal zijn nagedachtenis in Haarlem steeds in eere blijven.

Onze leden mogen hem in hunne gebeden gedenken.

LI RIPOZU EN PACO.

LETERVESPERO BERGEN OP ZOOM

La 20an de Oktobro ni organizis letervesperon por vigligi niajn kunvenojn kaj por propagandi inter filatelistoj. Pli ol tridek poŝtajoj alvenis el sep diversaj landoj, kaj estis disdonataj inter la ĉeestantoj por respondi. Feliĉe ni ne plu ege bezonis tian letervesperon, ĉar ĝoje ni rimarkis, ke tamen la konversaciaj vesperoj estas pli viglaj ol antaŭe. Daŭru tiel!

Jus pasis nia jarkunveno. La nombro da ĉeestantoj estis kontentiga.

Nenio ŝanĝis en la klubo, nur oni aprobis la estraran decidon por forigi la propagandan komitaton kaj redoni la propagandan zorgon al la estraro. Fine sekvis la komunikoj pri la unua kvin-jara festo. Ni intencas festi nian unuan kvinjaron kiom eble plej bone. Dank 'al la boneta stato de nia kaso, tio estos ebla.

Ni certe atendas ĉiujn niajn geanojn!

NIA KATOLIKA IDEALO.

ONTWAPENINGS-ACTIE

Naar aanleiding van het artikel in 't vorig nummer van „N. K.” ontvingen wij van 5 afdelingen verzoeken om inlichtingen. De afdeling Eho de Kujklando organiseerde op 29 Nov. bereids een propaganda-vergadering in Boxmeer, waarin ondergeteekende als inleider optrad.

Bij de andere afdelingen maakt dit onderwerp nog een punt van bespreking uit. In ons volgend nummer hopen wij hieromtrent nadere mededeelingen te doen. Intusschen worden inlichtingen gaarne verstrekt.

H. D.

BENOEMING REDACTEUR

Volgens besluit van het Hoofdbestuur van N. K. is met ingang van 1 December 1931, benoemd tot redacteur van ons orgaan: de Heer P. M. BROUWER te 's-Gravenhage. Het Hoofdbestuur spreekt hierbij de wensch uit, dat het redacteurschap van den Heer Brouwer er toe moge bijdragen de groei en de bloei van de Katholieke Esperanto beweging in Nederland te bevorderen en doet een beroep op alle leden den nieuwen redacteur naar vermogen in de uitvoering van zijn taak bij te staan.

Leden en afdelingsbesturen maken wij er op attent, dat het nieuwe redactie-adres van het orgaan vanaf heden gevestigd is: PAHUDSTRAAT 134, 's-GRAVENHAGE.

J. H. WESTEN.

secretaris.

REGLEMENT JEUGDAFDEELINGEN

In aansluiting op het door de algemeene vergadering van I.K.U.E. op 16 Augustus j.l. aangenomen „Regularo por la junulaj fakoj en la Landaj Ligoj de I.K.U.E.” is het hoofdbestuur van Nederlanda Katoliko klaargekomen met de tekst van een reglement voor jeugdafdelingen in N. K., 't welk de a.s. jaarvergadering als bestuursvoorstel zal bereiken. Het bestuur is voornemens dit concept-reglement met een memorie van toelichting in het nummer van Januari 1932 te publiceeren,

We maken van deze gelegenheid gebruik, nu reeds de opmerksaamheid der besturen der plaatselijke afdelingen op deze zeer belangrijke aangelegenheid te richten en het na publicatie in hun afdelingen te doen bespreken.

DE SECRETARIS.

ZAMENHOF-MONUMENTO

Aan Afdelingsbesturen, Leden en Begunstigers van N. K., die nog geen bijdragen zonden voor het monument, moge ik herinneren

aan hetgeen hierover staat in N. K. Aug. j.l. blz. 46 en 47 en aan de circulaire van Oct.

Voor den bouw van het monument kan men bijdragen door storting van:

- A. F. 1,50 of meer en vermelding van het bedrag en den naam der vereeniging of van den afzonderlijken persoon op daarvoor bestemde deklaro. De namen der gevers zullen dan worden vermeld in het „Ora Libro de la Monumento“.
- B. F. 0,15 voor elke „briko“.
- C. F. 0,10 voor elke briefkaart, waarop afbeelding van het monument.

Men vermeldte op de strook der kennisgeving van storting of men wenscht deklaro en/of brikoj en/of kartoj.

Bij bestelling van brikoj of kaarten, al zou het totaalbedrag F. 1,50 of meer zijn, wordt dit niet vermeld op een deklaro. Dit ter voorkoming van misverstand. Echter heeft men reeds door de geringe bijdrage van 10 of 15 cent deel aan het monument.

Niemand blijve achter. Stort spoedig Uw bijdrage op postrekening 82984 van F. MARREVEE, DEN HAAG.

ESPERANTO EXAMENS

Esperanto examens voor dipl. A te *Arnhem* in het *Esperanto domo*, den 28 Dec. 1931.

Candidaten gelieven zich aan te melden uiterlijk vóór 14 Dec. bij den Secretaris: *H. J. Bulthuis*, Kamillestraat 37 Den Haag, per brief, per postwissel of per Giro No. 174620, met vermelding van: woonplaats; volledige namen; jaar, datum en plaats van geboorte.

Examengelden bedragen:

3 gulden, voor de leden van: LEEN, NK, FLE, Ver. van Chr. Esp. en NOSOBE (Ver. van blinde Esp.).

Andere kandidaten betalen 5 gulden.

Zij, die vooruit de examengelden niet hebben gestort, zullen niet tot het examen worden opgeroepen.

De Secretaris,
H. J. BULTHUIS.

ESPERANTO EXAMENS (DIPLOMA A)

op 24 October 1931 te Utrecht

Aantal deelnemers: 147. Geslaagd: 91 kandidaten. Afgewezen: 56 kandidaten.

Geslaagd zijn de navolgende N. K. leden: Mej. K. J. M. Keve, Amsterdam, en de Heeren J. F. Plas, Amsterdam, C. Wijn, Eindhoven, A. L. M. Somers, Halsteren, A. S. A. Berends,

M. C. v. Dam, Th. v. Engelen, J. H. Ross, H. J. van Rijswijk, J. M. Smeets, J. J. Streumer, J. L. G. Teunis, C. G. Vleugel, allen te Hilversum en de Heer J. A. Weber, Utrecht.

De uitslag van het examen voor het diploma B, dat te Arnhem is gehouden, zal spoedig worden bekend gemaakt.

STATUTEN

Deze zijn verkrijgbaar bij den penningmeester, den Heer J. LEIBBRAND, ROZENSTRAAT 12, TILBURG.

Voor AFDEELINGEN, 5 ct. per ex ongefrankeerd.

Voor ANDEREN 10 ct. per ex. franco per post.

KOMUNIKOJ DE LA NEDERLANDA ABONPERANTO DE „ESPERO KATOLIKA“

- 1e Tuj skribu al ni, kiam vi ne regule ricevas „Espero(n) Katolika(n)”; estas nepre necesa ke la servo je la abonantoj estu akurate plenumata.
- 2e Ne sendu monon aŭ leterojn k.t.p. rilate „Espero(n) Katolika(n)” al Sro Schendeler. Tiu sinjoro jam estas sufiĉe okupata kaj tiam vi postulas de li, ke li transdonu vian skribajon aŭ monon al ni.
- 3e Anoncoj povas esti sendataj ankaŭ al ni.

CENTRA NED. KAT. ESPERANTO LIBREJO
EINDHOVEN.

DUM LA KRISTNASKA LIBERTEMPO AL ARNHEM!

La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto kore invitas la Esperantistojn al la Esperanto-Domo.

De la 27a - 31a de Decembro okazos diversaj prelegoj ĉefe de membroj de la Ekzamena Komitato, speciale por prepari al la ekzamenoj. Oni havos okazon fari demandojn, ANKAŬ en NEDERLANDA LINGVO.

PROGRAMO

Dimanĉo, 27-Dec. 8a vespere, S-ro J. R. G. Isbrücker pri la historio kaj movado de Esp. S-ro Isbrücker donos tiujn faktojn, kiujn bezonas scii la kandidatoj.

LUNDO, 28-DEC. 9.30 MATENE, EKZAMENO POR A-DIPLOMO.
8a vespere, S-ro P. Heilker pri la Esp. Literaturo.

Mardo, 29-Dec. 10a matene, S-ro P. Heilker pri la Prepozicioj.
Diskutoj. 3a posttagm. Ekskurso.

8a vespere, S-ro Andreo Ĉe pri Elparolado. Diskutoj.

Merkredo, 30-Dec. 10a vespere, Frato Wigbertus van Zon pri la Katolikaj Kongresoj kaj Movado.

3a posttagm. Respondado de demandoj de la partoprenantoj.

8a vespere, S-ro Andreo Ĉe pri Universala Esperanto-Asocio.

Ĵaŭdo, 31a-Dec. 10a matene, S-ro Andreo Ĉe pri la Ĉe-metodo.

Prezroj de plena pensio dum restado de almenaŭ 5 tagoj:

Por ĉambro por 5-10 personoj po 3,25 gld. tage.

" " " 2-4 " " 3,75 " "

" " " 1 " " 4,25 " "

Por restado de malpli ol 5 tagoj:

Ĉambro kun matenmanĝo resp. 2 gld., 2,25 gld., kaj 2,50 gld.

Ni forte rekomendas rezervi komunan ĉambbron. La ĉambroj estas vastaj kaj freŝaj. La litoj apartigitaj de ŝirmiloj.

Anoncu vin baldaŭ pagante 3,50 gld. kiel enirmonon por ĉiuj prelegoj. Poŝtĉekkonto: Internacia Cseh-Instituto de Esp. 162626. Bonvolu precize indiki la tagon de via alveno kaj aldoni, ĉu vi estas sinjoro aŭ sinjorino.

La Esperanto-Domo estas atingebla per linioj 1 aŭ 7 de la stacidomo. Veturu ĝis haltejo „Huijgenslaan“. Tiam sekvu la saman vojjon ĝis la unua aleo dekstre. Atentu la negarditan fervojon!

La Direkcio,

OOSTDUINLAAN 32, DEN HAAG.

ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANISTOJ.

Verko vere utila kaj rekomendinda al ĉiuj. Neniu esper.organizaĵo devas preterlasi la okazon por aĉeti tiun libron, kiu servos por kelkaj jaroj al ĝi kaj ĉiuj ĝiaj anoj en ĉiu bezono de kontakto kun eksterlando. Oni devus deziri, ke aliaj landoj eldonu similajn enlandajn Adreslibrojn, por-ke la kultura kontakto inter gesamideanoj de la diversaj landoj estu per ili en la tuta mondo plifaciligita.

La libro estas ricevebla principe en ĉiuj ĉefaj esperanto-librejoj aŭ senpere ĉe la eldoninto: Johano Zawada, VARSOVIO (Warszawa) ul. Zaciszna 2. M.O. Czerniakow, POLLANDO. Monon sendu per internacia poŝtmandato, en rekomenditaj leteroj au al pola Postŝparkaso-konto 20845 Varsovio, per la Konto de POLA POST-SPARKASO en tiuj landoj, kie ili ekzistas (12 landoj de Mezeuropo-) demandu ĉe via poŝtŝparkaso.

BOEKBEOORDEELINGEN.

„ELEMENTARA LERNOLIBRO DE ESPERANTO“

5e druk, van P. A. Schendeler.

Gebr. L. & M. Bek, Veghel; 30 ct.

De verschijning van den wel wat lang uitgebleven vijfden druk van dit boekje verheugt mij ten zeerste; want met zijn bijbehoor-

tende „Sinkorektilo” (zich zelf corrigeer-middel) vormt het een zeer goed en bovendien zeer goedkoop leermiddel voor Esperanto, vooral nu er enkele onjuistheden uit verdwenen zijn.

Toch durf ik mij een paar opmerkingen veroorloven:

1. Op bldz. 23, bij het bijwoord zegt de bewerker: „Om te zeggen, *hoe* iets gedaan wordt, gebruiken we bijwoorden (uitgang *e* b.v. Mooi schrijven — bele skribi”. — Maar, hoe vertaalt hij dan: Doe dat spoedig? — Natuurlijk door: Faru tion baldaŭ; zonder *e*! En: morgaŭ, jes, jam, k.t.p., ĉiuj sen *e*, ĉu ne? Beter ware het dus te zeggen: „Alle *afgeleide* bijwoorden eindigen op *e*”. — De woorden die op zichzelf reeds bijwoorden zijn, nemen dus die *e* niet aan”.
2. Op bldz. 22, staat: „*Si* indikas la saman personon kiel la subjekto”. Goed: maar op bldz. 65 zegt de schrijver in een voetnoot: „Bona elparolado en Esperanto ne konsistas el tradukado, sed el rekta esprimado de *siaj* pensoj esperantlingve”. — Is het gebruik hier van *siaj* volgens bovengegeven regel? — Zeker, de zin is duidelijk genoeg. Toch zou ik hier dit woordje niet gebruiken; natuurlijk ook niet *iliaj*. Om zeker correct te zijn, zou ik het woordje *siaj* eenvoudig uitgelaten, en zeggen: esprimado de pensoj”. Of hier gebruikt moet worden: konsisti *el*, of konsisti *en*, hierover valt nog te *diskuti!*
3. De schrijver laat ook gebruiken: ĉi-kune, ĉi-supre, ĉi-sube, ĉi-flanke, ktp. (bldz. 36). Dr. Zamenhof zegt in „Lingvaj Respondoj” (plena Kolekto) bldz. 54: „La uzado de streketo inter la *montra* vorto kaj *ĉi* (ĉi tiu ktp.) ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo kiun nenio pravigas”. — En in „Dr. Zamenhof’s Sprachliche Gutachten” zegt Walter Lippmann: (bldz. 42) Die obige Regel dürfte sich nicht nur auf die hinweisenden Fürwörter, sondern auch auf andere Anwendungsfälle von *ĉi* beziehen: ĉi kune, ĉi apude, ĉi (mal) supre, ĉi transe”.

Uit alles blijkt, dat het gebruik van dit streepje in dergelijke gevallen af te keuren is. —

Er zijn bij dezen herdruk ook meerdere storende drukfouten verdwenen; maar, helaas, zijn er weer andere ingeslopen. Drukproeven corrigeren schijnt voor iedereen ’n moeilijk werk te zijn: ook ik kan van ondervinding spreken. — Alles bij elkaar genomen, beveel ik het boekje WARM aan. Het is tevens een prachtig middel voor propaganda; ikzelf heb er honderden van aan den man gebracht: Voor 75 cent: Leerboekje 30 cent, Sinkorektilo 30 cent en nog een sleuteltje van 15 cent, en elke nieuwe esperantist heeft voorloopig voldoende materiaal om zich Esperanto eigen te maken.

Frater Wigbertus van Zon.